# NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

**Ekde 1985 ĝis Februaro 2010 redaktis kaj eraris Lupe Sanz** **FEBRUARO 2010**


**En aparta folio oni inkludas protokolon de la Ĝenerala Kunsido kaj historio de MEL inter 1984-2009**

## NEKROLOGO

La pasintan 29an de novembro forpasis **Antonio Moya Casado,** direktoro de orkestro, li estis membro de MEL ekde 1994. Li geedziĝis kun filino de E. Tudela Flores, aŭtoro de fama vortaro esperanto-hispana. La nupta ceremonio de Antonio kaj Vicenta oni celebris en esperanto. Pace ripozu.

## DU NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE MEL : Lupe Sanz kaj Carmen Suárez

Mi tre dankas mesaĝojn kiuj proponas mian honoran membrecon pro tio, ke mi estis en MEL dum pli ol 25 jaroj membro, estrarano kaj redaktorino de Nia Voĉo. Ankaŭ mi dankas apogon al mia propono ke Carmen Suárez devas akompani min kiel honora membro. Ŝi estas membro de la estraro de MEL ekde 1987 (unue sekretariino, poste vicprezidantino kaj ekde 1997 prezidantino de MEL). Kiam MEL forlasis sidejon de la strato Atocha ŝi proponis ŝian domon kiel oficiala sidejo de MEL kaj ĝis nun tiel estas en la statutoj.

Ankaŭ Carmen ne dubis akcepti esti sekretariino de HEF (samtempe ol MEL prezidantino) kiam oni proponis al ŝi la postenon por solvi problemon post la demisio de la Estraro de HEF en 2007. Ŝi kaj mi akceptis esti provizoraj estraraninoj de HEF en kies postenoj ni restis ĝis 2008.

Escepte du jarojn dum kiuj mi estis prezidantino, unu jaron vicsekretariino kaj aliaj du jarojn voĉdonanto de MEL, mi estis sekretariino ekde 1989 ĉiam kun Carmen en MEL-estraro kiel vic- au prezidantino. Sen ŝia apogo kaj helpo mia laboro en la Liceo ne estus ebla.

(Subskribas Lupe Sanz)

## EN HISPANIO

La kuba samideano Andy Hernández, nun loĝanta en Madrido, kaj Toño pligrandigis artikolon "Madrido" en la **Esperanto-vikipedio**, ĝi estis elektita "Artikolo de la Semajno" (11-17 januaro). http://eo.wikipedia.org/wiki/Madrido

La libro **"Crónicas del Movimiento Obrero Esperantista"**, verkita de A. Marco Botella, en hispana versio, jam estas eldonita. Vi povas aĉeti ĝin po 8 € skribante al pedrosanzsateh@gmail.com

Oni vendas po 7 € dulingvan eldonon de **"La liberación del juez"**, originale verkita en esperanto de Szilágyi, kiun tradukis al la hispana Javier Guerrero. Estas salutinde ke profesia eldonejo eldonas dulingve E-beletraĵon, kaj ĝin disvendas en normalaj librovendejoj. Intervjuoj kun Javier Guerrero aperis en “El Público” digital (2010-01-04)- laŭ la titolo “Internet es una revolución para el esperanto” kaj en “La Vanguardia (2009-12-15)

La elektronika biblioteko de la Diputación de Soria eldonis kompaktan diskon, **“Esperanto y traducción: utopía y realidad”**. Inter aliaj ĝi enhavas prelegojn de Rafaela Urueña, Pedro Garrote kaj Rodrigo Portela, de Valadolido.

## AMASMEDIOJ

Pli da ĵurnal-eltondaĵoj ĉe www.esperanto.es > Esperanto > ĵurnal-eltondaĵoj.

La 24/25an de decembro, oni menciis Esperanton en la TV-Cuatro **"El Hormiguero"**. En mok-sceno oni diris "La patrino de tiu knabeto estas senlabora tradukistino de Esperanto".

**"Diario Médico"** (2009-12-29), Efemérides “150 años del oftalmólogo 'autor' del esperanto. La Real Academia de Medicina de Cataluña y la Kataluna Esperanto Asocio le han dedicado una sesión”.

Denove, **Fernando Savater** ("Clarin" 2009-12-10 Argentina) malapogis esperanton dirante malveron pri la vorto “kodak”. *“En cuanto al esperanto, pese a su ingeniosa y racional construcción, no cabe sino certificar su fracaso. Sólo un indudable éxito se apuntó su creador, el industrioso doctor Zamenhof. A comienzos del pasado siglo, una empresa americana que se disponía a patentar la primera cámara fotográfica portátil le pidió un nombre para su producto que fuese igualmente eufónico en cualquier lengua. Y Zamenhof acuñó la única palabra de esperanto que todos hemos pronunciado alguna vez: kodak.”*
(Fakte estis George Eastman, la fabrikisto de la samnomaj fotiloj, kiu inventis la vorton “Kodak”, do, ĝi havas nenian rilaton al Esperanto).

.

**ESPERANTA MONDO**

Ekde 2010 la oficiala organo de UEA, la **revuo "Esperanto"**, estos legebla rete kontraŭ malpli alta pago.

La 8-a Ĉina Kongreso de Esperanto okazis en decembro en Nankino. Partoprenis ĉirkau 400 esperantistoj, inter ili **Augusto Casquero.**

Unu jaron pli la **Papo** kristnaske salutis en esperanto. En la Placo de Sankta Petro italaj esperantistoj portis panelojn kun la literoj ESPERANTO, kion oni povis vidi en la TV.

**KONGRESOJ**

95-a Universala Kongreso de Esperanto: Havano, Kubo, 17 - 24 Julio 2010: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html . Kongresa temo: “Internacia Jaro de Interproksimigo de Kulturoj”, proklamita de UN kaj Unesko. Kongresejo: Palacio de Convenciones. Vojaĝado: La nacia flugkompanio Cubana havos specialan tarifon por la kongresanoj.

La 43-a ILEI- Konferenco (11 - 17 Julio) okazos en la hotelo Caminao en Matanzas. Aliĝilo kaj pliaj informoj ĉe http://www.ilei.info/konferenco/2010/KUBO_Unua_bulteno.pdf.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

1-an de februaro la konversacia rondo estos gvidata de Juan del Castillo.

15an de februaro: Nia Hispanio: Almería (fotografaĵoj komentitaj de Lupe)

**KURSOJ DE ESPERANTO**

http://meneame.net/story/quieres-aprender-en-esperanto

*******************************************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID

## MADRIDA ESPERANTO-LICEO en la jaroj 1984-2009

Lupe Sanz Bueno

Kiel vi scias mi lasos la estraron de MEL kaj la redaktadon de "Nia Voĉo" post 25 jaroj. Mi ne diras adiaŭon ĉar mi daŭre restos kiel aktiva membro de MEL kaj partoprenos regule en lundaj konversaciaj rondoj. Ankaŭ la nova estraro scias ke ĝi povas kalkuli je mia helpo. Mi deziras resumi la agadon de la Liceo dum la lastaj jaroj; jen la rezulto:

STATUTOJ

En Madrido ekzistas E-asocio ekde 1907 (Madrida Esperanto Klubo), en 1953 ĝi estis leĝe registrita je la nomo de Liceo Madrileño de Esperanto, kiu havis aprobitajn statutojn en 1962 kiel nacia asocio numero 1096. En 1979, por aperi senpage en telefonlisto lau la vorto "esperanto", oni ŝanĝis la nomon al ESPERANTO LICEO DE MADRID. Ĝi estis registrita kiel provinca asocio numero 245.

En 1991, por peti municipan publikan utilecon, denove ĝi ŝanĝis la "ámbito de actuación" al la urbo Madrido. Ekde nun ĝi estas asocio je municipa publika utileco (1993). En 1995 oni ŝanĝas la statutojn por meti novan adreson de la sidejo (la domo de la Prezidantino Carmen Suárez). En 2005 la statutoj estis adaptitaj al la nova leĝo pri asocioj.

PUBLIKA UTILECO

Dank'al la agado de Juan Carlos Ruiz Sierra, MEL atingis la municipan publikan utilecon en 1993, antaŭ ol HEF. Por konservi la titolon oni devas prezenti diversajn dokumentojn jare. La publika utileco faciligas la atingon de subvencioj (la monaj subvencioj de la Madrida Urbodomo nur estas por publik-utilecaj asocioj) kaj ankaŭ povas atingi aliajn avantaĝojn en la municipo de Madrido.

MEMBRARO

Inter la dokumentoj kiujn petas la urbodoma registraro estas la nombro da membroj kiuj pagas kotizon jare. MEL finis la jaron 2009 kun 32 membroj kiuj pagas regule au ŝuldas malpli ol 2 jarojn.

Evoluo de la membraro en la lastaj jaroj

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1996 | 82 | 2001 | 50 | 2005 | 37 | 2009 | 31 |
| 1997 | 84 | 2002 | 48 | 2006 | 37 | | |
| 1998 | 48 * | 2003 | 47 | 2007 | 33 | | |
| 1999 | 53 | 2004 | 42 | 2008 | 30 | | |

* Aktualigo de datumbazo kun malmembriĝo de membroj kiuj ŝuldas pli ol du jarojn.

En la lastaj jaroj la Ĝenerala Kunsido de MEL nomumis jenajn **honorajn membrojn:**

1987.- Augusto Casquero (tre aktiva Prezidanto de MEL je la komenco de la jaroj 80aj)
2001.- Federación Española de Esperanto (en kies sidejo okazas ĉiusemajne la konversacia rondo de la Liceo)
2001.- Gian Carlo Fighiera (tre aktiva membro dum la jaroj en kiu li, kun lia edzino Ada Sikorkska loĝis en Madrido, ambaŭ altigis la nivelon de esperanto en nia asocio)
2005.- Gerardo Flores (n-ro 1 de la Liceo, aktiva membro kaj Prezidanto de MEL en la 60-aj jaroj kaj unu el la homoj kiuj partoprenis en la aĉetado de la sidejo de HEF nur parte oficiale subvenciita)
2009.- José F. Platas kaj Koruso "Verda Stelo" kaj en 2010 Lupe Sanz Bueno kaj Carmen Suárez (tri membroj kiuj estis estraranoj dum dekoj da jaroj kaj kies ĉefaj agadoj dum iliaj estraranecoj aperas sube).

ESTRARO

Kelkaj membroj de la malnova estraro estas estraranoj dum dekoj da jaroj.

| | | |
|---|---|---|
| José F. Platas | 2009-1980 | + 29 años |
| Lupe Sanz | 2009-1984 | + 24 años |
| Carmen Suárez | 2009-1987 | + 22 años |
| Angelita Sanz | 2009-1996 | + 13 años |
| Jaime Vinielles | 2009-2002 | + 7 años |

En 2010 oni devas elekti novan estraron. La malnova estraro serĉis novajn kandidatojn kaj finfine oni trovis novan estraron por 2010-2014 dank'al la kunlaboro de Juan del Castillo kaj Manolo Parra, kiuj akceptis esti estraranoj.

ĈEFAJ AGADOJ DUM LA PERIODO 1984-2009

Nia Voĉo. Dum 25 jaroj la flugfolio de modestaj paĝoj sed granda en kvalito je informado kaj eĉ utila por interesiĝi pri la esperanto-movado en Madrido kaj Hispanio, aperis seninterrompe laŭ "redaktis kaj eraris Lupe Sanz".

Mi, Lupe, deziras danki al ĉiuj kiuj helpis min en la laboro: al Marcos Cruz kiu helpis en la redaktado kaj enkomputiligis unuafoje nian bultenon; en la redaktado la unuajn jarojn al Gian Carlo Fighiera, en la korektado al Pedro Garrote, Manolo Parra kaj ĉefe al Darío Rodríguez kiu la lastajn jarojn korektis la tekston kaj pdf-igis word-arĥivojn, afero kiu aspektas simpla sed ne estas facila en la komputilo de mia oficejo ĉefe pro la supersignaj literoj kaj la interrreta konekto de la oficejo. Darío ankaŭ dissendis la arĥivojn al la forumoj kaj metis en sian personan pagharon. En tiu senco mi ankaŭ devas gratuli al Jesús de las Heras kiu metis Nian

Voĉon en Gazetoteko-Lanti. La kolekto de NV estos baldaŭ, preskaŭ kompleta, en la paĝaro de HEF ene de la paĝo de MEL.

La apero 10 fojojn jare de NV estis rezulto de mia persista kaj disciplina laboro dum 25 jaroj, pli facile dum la lastaj kiam la novaĵoj cirkulas en interreto tra la forumoj.

Simpla bulteno kiel NV estas atendata ĉiumonate de multaj esperantistoj kaj ĝia enhavo, kiu estas resumo de la plej gravaj aferoj kiuj okazis dum la monato, servas kiel arĥivo de multaj novaĵoj kiuj aperis en la forumoj kaj de kiuj ne restos registro por la onto.

Mi deziras al la nova redaktoro, Manolo Parra, longajn jarojn da laboro, li scias ke kalkulas je mia helpo, almenaŭ dum la unuaj monatoj.

Konversacia rondo

Ĉiun lundon okazis, sen interrompe, konversacia rondo, ĝis 1998 en strato Atocha kaj poste en la sidejo de HEF. Dum la unuaj jaroj samtempe okazis "sobaquillo" ĉar kelkaj el la partoprenantoj portis manĝaĵojn, ĉefe la geedzoj Fighiera kiuj portis bonegan kuiraĵojn faritajn de Ada.

Dum du/tri jaroj okazis unufoje monate babilado en Ateneo de Madrid, gvidata de Lucrecia San Antonio, kaj en kafejoj, gvidata de Miguel Fernández kaj la du lastajn jarojn de Pedro Hernández.

Bedaŭrinde nuntempe nur estas "kvar katoj" en nia konversacia rondo, escepte la unuan lundon de la monato, kiam Juan del Castillo gvidas specialan babiladon.

Kursoj

Oni organizis kursojn en la sidejo de MEL (Atocha), de HEF kaj en aliaj lokoj: (Ateneo, Amigos de Unesco, C. C. Maestro Alonso, CNT, U, Autónoma, Biblioteca Vázquez Montalbán, Centro Puerta de Toledo, Inaltel, ktp). Ĉiuj dank'al la helpo de profesoroj de la Liceo (Augusto Casquero, Miguel Fernández, Juan del Castillo, Navareño, Carmen Suárez, Georgette, Dennis, Fernando Moral, Luis González, Luis Ojer, Antonio Tur, Alejandro Pareja, ktp); ĉiuj anoncitaj per abundaj reklamoj sur la madridaj stratoj.

Bedaŭrinde la granda kultura oferto en Madrido dum la lastaj jaroj malkreskigis la nombron da gelernantoj kaj profesoroj, kiuj preferas alian aktivaĵon por sia libertempo. Pro tio nun la Liceo apogas kaj propagandas la korespondan kurson de HEF (gvidita de Fernando del Moral) kaj dankas la laboron de Pedro Hernández, la nura profesoro nun en Madrido

Eldonaĵoj de MEL en la periodo 1984-2009

Dank 'al la atingo de subvencioj kaj al la vendado de libroj, la ekonomio de la asocio estis bona kaj ĝi povis eldoni novajn librojn:

1988 Semtempa simfonio COMISIÓN ESPAÑOLA UNESCO
1988 La domo de Bernarda Alba/Sanga nupto M. CULTURA Donacita al Kongreso de 1986
1992, 94, 95, 97 ,99 y 2001 Eldono de "Adresaro de hispanaj e-grupoj"
1993 Esperanto fenómeno de la comunicación M. CULTURA DIR. GRAL. LIBRO
1987 y 1993 Datos acerca del movimiento esperantista
1994 Historia del esperanto en Madrid GRAFIKA DOS S.L. Donacita/ota
2002 Nuevo metodo de esperanto (de F. de Diego)
2006 El hombre que desafió a Babel

Aliaj objektoj faritaj dum la periodo

T Ĉemizoj Donacitaj en la Kongreso de 1986
Ŝlosilujoj Donacitaj en la Kongreso de 1986
Etikedoj "Mi amas esperanton" + telefono de HEF. Donaco de Demetrio Estévez
Ŝildo "Mi amas esperanton"

Kongresoj organizitaj en la provinco de Madrido dum la periodo

1986 Congreso Nacional en Madrid. Centenario esperanto
1992 Congreso Nacional en Alcobendas
2000 Congreso Nacional en S. Sebastián de los Reyes
2005 Congreso Nacional en Alcalá de Henares

Aliaj eventoj

La nombro da eventoj programitaj dum la periodo estis granda kaj oni povas vidi resumon en la jaraj memoroj. Jen nur kelkaj:

Karavano al diversaj UK (Budapesto, Pekino, Varsovio) kun pli ol 15 personoj; Koruso (kaj Orkestro) Verda Stelo, unue gvidata de Pedro Vilaroig kaj poste de Laura Cabello, La Liceo devas danki al Pedro Vilaroig (muziko), kiu kune kun Juan Carlos Ruiz (verko) faris la himnon de la Liceo; partopreno dum pli ol dek jaroj en "Fiesta de las Migas" de Jadraque.

En 1993 membroj de MEL aktive agadis dum la UK en Valencio, ĉefe Augusto Casquero, Juan Carlos Ruiz Sierra, Pedro Garrote, Lupe Sanz, Carmen Suárez, Miguel Fernández, Angelita Sanz, Ana Manero, Ana Montesinos, ktp

Dum 15 jaroj oni partoprenis en la "Fiesta de las Migas" en Jadraque, kie oni faris grandan reklamon pri esperanto, same kiel en "Maratón de cuentos" de Guadalajara, en kiu dum 3 jaroj MEL partoprenis per rakontoj en esperanto.

En 2003 kaj 2004, Liceo aŭspiciis la programon "Descubriendo Madrid" kiu propagandis esperanton antaŭ la prezentado de DVD pri la historio de Madrido.

En 2009 ĝi organizis Forumon "Esperanto y Zamenhof". Laŭ mia opinio estis sukceso dank'al la helpo de madridaj esperantistoj, bedaŭrinde la novaĵo ne aperis en Boletín ĉar neniu sendis ĝin al la redaktoro.

Liceo ĉiam kunlaboris en la programoj de HEF kaj Fundación.

Ekonomio

Parto de la programo de MEL estis subvenciita, oni atingis jenajn subvenciojn:

1986 Madrida Urbodomo 900€
1986 Madrida Aŭtonoma Komunumo 450€
1988 M. pri Kulturo 1500 € por eldoni la libron La domo de B. Alba
1988 Hispana Komisiono pri UNESKO. Eldono de "Sentempa simfonio"
2005 Fundación Esperanto 400€
2009. Fundación Esperanto 300€

La atingo de subvencioj kaj la vendado de libroj produktis bonan MEL-ekonomion kiu permesis havi la saman kotizon (12€) ĝis nun (16 jaroj) kaj eldoni la du lastajn librojn sen subvencio.

Kiel informo oni inkludas datumojn de la bank-konto kaj bank-depono de MEL:

| | Bankkonto | Bank-depono |
|---|---|---|
| 1988 | 861€ | 0 |
| 1994 | 3.100 € | 12.000 € |
| 2000 | 1.583 € | 21.000 € |
| 2006 | 2.900 € | 21.500 € |
| 2009 | 1.298 € | 28.000 € |

Mi deziras danki al ĉiuj kiuj apogis la agadon de la malnova estraro kaj permesis plenumi la programojn de aktivaĵoj jaron post jaro. Mi petas la saman apogon al la nova estraro al kiu mi deziras plenan sukceson.

Lupe Sanz

**ACTA Nº 46**

En la Federación Española de Esperanto, el 25 de enero de 2010, a las 18,30 horas, en segunda convocatoria, se celebró, previa convocatoria por la Presidenta, la Asamblea General Ordinaria de Esperanto Liceo de Madrid, con el siguiente orden del día.

**1.- Informe sobre los socios.**

| | | |
|---|---|---|
| Socios en situación de alta a 31 diciembre 2009 … | | 32 |
| Al corriente de pago | 23 | |
| Con una cuota pendiente | 3 | Nº 506, 528 y 530 |
| Socio de honor | 6 | Nº 1, 29, 121, 187, 503 y 520 |

Variaciones en 2009:

| | | |
|---|---|---|
| Altas | 2 | Nº 422 y 532 |
| Baja por fallecimeinto | 1 | Nº 510 Antonio Moya |

A propuesta de varios socios se acuerda nombrar socios de honor a 2 miembros de la Directiva saliente que han ocupado cargos directivos durante varias décadas y cuya labor en el desarrollo de las actividades del Liceo ha sido destacada durante su gobierno:, Carmen Suárez Fernández-Cid (nº450) y Lupe Sanz Bueno (nº 391).

**2.- Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea anterior.**
Se aprobó el acta nº 45, publicada en el boletín de febrero de 2009.

**3.- Balance económico 2009.**
El saldo a favor a 31-12-2009 es: Banco Sabadell/Atlántico 1.288,90 euros, en depósito a plazo 28.000 euros, en caja 54,60 euros, en cuenta UEA-Rotterdam 36,62 euros; total en tesorería 29.380,12 euros.
Además hay un stock en la librería Don Libro de "El hombre que desafió a Babel" (494 ejs) y "Nuevo método de esperanto" (297 ejs).
La Secretaria comenta que a fecha 31-12-2009 estaban pendientes de ingreso 200 euros que Andaluzia Esperanto-Unuigho ingresó por error en la cuenta de HEF en lugar de la de MEL. A fecha de hoy la deuda es de 100 euros.
El balance del ejercicio, publicado en el nº de enero de 2010 de Nia Vocho. fue aprobado por unanimidad.

**4.- Presupuesto 2010.**
El presupuesto asciende a 1.900 euros. Incluye 1.000 euros para la adquisición de equipo informático si se consigue la subvención del Ayuntamiento. La cuota anual se mantiene, por décimo sexto año consecutivo, en 12,00 euros. El presupuesto, publicado en el boletín de diciembre 2009, fue aprobado por unanimidad.

**5.- Actividades desarrolladas en 2009.**
Se aprobó por unanimidad la memoria publicada en el número de enero de 2010 en la que se destaca el foro "Esperanto y Zamenhof: desafío a Babel" con motivo del 150 aniversario del nacimiento de L.L. Zamenhof.

**6.- Programa para 2010.**

El programa de actividades, publicado en el boletín Nia Vocho de diciembre 2009 fue aprobado por unanimidad.

Manuel Parra Benito sustituye a Lupe Sanz Bueno en la redacción de “Nia Vocho”. Se agradece la labor llevada a cabo por Lupe durante 25 años.

**7.- Elección de la Junta Directiva**

Por unanimidad se aprueba la única candidatura presentada a la Junta Directiva para 2010-2014.

Presidente Juan A. del Castillo Martínez
Secretario Manuel Parra Benito
Tesorero José Francisco Platas
Vocal José Antonio del Barrio Unquera

**8.- Ruegos y preguntas**

Lupe Sanz comenta que las cuentas del Liceo serán informatizadas por Raul Martínez Anguita, tesorero de HEF, a quien se acuerda agradecer su trabajo.

Al no haber ningún otro asunto que tratar la Presidenta dió por terminada la Asamblea General a las 20,30 h.

ORIGINAL FIRMADO POR

Secretaria

G. Sanz Bueno

VºBº Presidenta

C. Suárez Fernández-Cid